

Donner

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



BULGARA ESPERANTISTO

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01.

Ĉefredaktoro: **Violin Oljanov**

Redakta komitato: **Ivan Sarafov,**
Stefka Ĥristova, Stefan Kiraĝiev,
Stefan Maserov, Simeon Simeo-
nov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por eksterlando — 16 levoj, 1,5
dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Reklamoj. Ekstera kovrilpaĝo: tuta
— 1000 levoj, duono — 500, kva-
rono — 280. Interna: tuta — 900,
duono — 450, kvarono — 250. Ko-
respondanconcoj — 0.5 levo por vor-
to; eksterlandaj adresoj — sen-
page.

PERANTOJ DE «BULGARA ESPERANTISTO»

Albanio: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga
Stafa, Tiranë.

Koreo: Korea Esperanto-Asocio
Pjeng' jang, P. O. kesto 16.

Sovetunio: J. Kudrjavickij, PK 1255
Moskva K-9.

Nederlando: Ru Bossong, Flora-
plein 23, Eindhoven.

Rumanio: Mihail Popescu, Cal. 13
Septembrie 65, Bucuresti 5.

Italio. Julia Franceschi, Via Arri-
go Boito 6, Padova.

ENHAVO

S. Simeonov. Pli da zorgoj por la junaj aktivuloj (ĉefartikolo)	1
L. L. Zamenhof. La espero	2
Iv. Vazov. En Vatikano (versaĵo)	2
N. Liliev. Milito. Al la suno (versaĵoj)	3
V. Poljanov. Ŝia respondo (rakonto)	4
Supera distingigo de esperantis- toj	7
T. Pavlov. Esperanto en la mal- liberejo	8
Organiza vivo (J. Kalinov — Ruse, Ĥ. Manolov — P. Trâm- beș, S. Kadiev — Sofio, K. Uzunova — Levski, Iv. Dob- rovski — St. Dimitrov)	10
Tra la gazetaro	11
St. Kadiev. Ekskursa somerumo sub la verda standardo	12
Jon Luka Karaĝale. Rumana fer- vojo	13

LA REDAKCIO akceptas ma-
terialojn por la koncerna nu-
mero de «Bulgara esperantisto»
ĝis la 12-a de la antaŭa mona-
to. Nur kiel escepto gravaj ak-
tualaj materialoj estos akcepta-
taj ĝis la 25-a de la antaŭa mo-
nato.

La aŭtoroj estas petataj skri-
bi tre klare, kun granda inter-
linia spaco kaj margeno. Manu-
skriptoj ne estas resendataj.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

PLI DA ZORGOJ POR LA JUNAJ AKTIVULOJ!

Estas tute superflue ripeti la konatan veron, ke de nia nuntempa laboro en la junularaj medioj multe dependas la sukcesa evoluo de la movado en la estonteco. Sed grandskala kaj varia organiza kaj propaganda agado bezonas vastan reton de spertaj junaj aktivuloj, kiuj povus plenumi la taskojn kaj ankaŭ memstare iniciati aŭ gvidi la agadon.

Alte pritaksante la neceson refreŝigi la vicojn de la asocia aktivularo, la 34-a Kongreso en Târnovo aprobis specialan decidon tiurilate. Nome ĝi devigas nin pri sistema kaj laŭplana laboro por preparo de gvidantaj agantoj el la medio de la junularo (punkto 6 de la rezolucio).

Kiamaniere ni devas agi por la plenumo de tiu tasko? Ŝajne la plej simpla kaj natura vojo estas organizo de seminarioj por junaj gvidantoj. Sed nei entute tiun formon de agado, tiu estas la plej formala solvo de la problemo. Ĉu la grandaj elspezoj por simila aranĝo estos pravigitaj de la rezultoj, estas ankaŭ duba afero. Tute alie prezentiĝas la problemo, se tia seminario povus esti enkadrigita en somera tendaro aŭ alia tiaspeca aranĝo. Tiam en pli natura atmosfero ankaŭ la rezultoj estos pli grandaj.

La vera laboro tamen restas por plenumo surloke en la societoj kaj tio estas tiel, ĉar la aktivuloj sin bakas en la ĉiutaga vivo. Ni devas atenti la interesojn kaj la emojn de la junularo. La fando kaj funkciado de junularaj grupoj ĉe la societoj estas tre grava por eduko kaj aktivigo de la junaj gesperantistoj. Ili mem laŭ sia gusto kaj plaĉo devas elekti la formon de la okupiĝo kaj la agado inter la junuloj. Niaj junaj gesamideanoj plej bone kaj efike povas agi kaj propagandi inter la junularo. Krome, en la memstara laboro plej bone formiĝas kaj elstaras novaj aktivuloj kaj gvidantoj. La formado de aktivuloj estas laboro kun la homoj kaj pro tio unu el la plej malfacilaj. La ĉefa afero estas rimarki la homojn. Ilia agado ne devas resti nerimarkita kaj neprijuĝita. Ĉiu devas ricevi almenaŭ moralan rekompencon por sia sindonemo kaj aktiveco.

Al la junuloj, kiuj montras kvalitojn por organiza kaj amasa laboro, ni senhezite kaj kuraĝe ni devas doni taskojn pli grandajn ol ili ĝis tiam plenumadis. La societoj pli kuraĝe elektu junulojn kiel estraranojn.

Al ili ni helpu en la malfacila organiza laboro, por ke ili lernu kaj iom post iom spertiĝu tiurilate. Se ni agas kun la necesa atento ni akiros por nia movado freŝajn fortojn, novajn gvidantojn.

L. L. Zamenhof

LA ESPERO

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion:
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj,
sed dissaltos la obstinaj baroj,
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l'homaro
por eterna ben' efektiviĝos.

Ivan Vazov

EN VATIKANO

Kiam Galileo, vera hom' honesta,
diris: «Turnas sin la Tero»,
tiam el la fund' de tiu fia nesto
de mallumo kaj malvero
tuj eksonis anatemaj vortoj:

«Al satano morton, morton!»

Kiam Gutenbergo, sub inspir' genia,
vortojn presis la unua,
kaj la lumo el malliberejo lia,
kiel bird' eskapis brue, —
el la pap-palac' ektondris vortoj:

«Al satano morton, morton!»

Kiam Hus', per vortoj ardaj, elokven-
taj,
la mallumon pelis foren
kaj de la mensogo mem la fundamen-
ton
frapis per raci-toporo,
tiam oni aŭdis samajn vortojn:

«Al satano morton, morton!»

Kiam poste la profet' Voltero
kun plejado batalantoj
pafis dogmojn, tronojn, pastrojn kaj
malverojn,
diris: «Estu lumsemantoj!»
ree el mallum' eksonis vortoj:

«Al satano morton, morton!»

Sekvis sin jarcentoj. Batalantoj brave
mortis por triumf' de l'saĝo,
kaj je ĉiu paŝ' kaj pens' kaj faro prava
tondris tiu kri' sovaĝa...

Sed — spitbrilas lum', ho Vatikano!
Gloron, gloron al satano!

Tradukis: Simeon M. Simeonov

NIKOLAJ LILIEV

En oktobro ĉi jare mortis la talenta bulgara poeto akademiano Nikolaj Liliev. Jam de duonjarcento liaj versoj vekas admiron kaj amon ĉe la ŝatantoj de la poezio en nia lando. Ankaŭ nun liaj versaĵoj kun amo estas legataj kaj parkerataj, ne forvelkas ties lazura beleco, ne fineĥas iliaj mirindaj melodioj. En ili pulsas unu milda koro, en ili reflektiĝas la revoj kaj la suferoj de unu honesta vivo, en ili tremas granda homa konscienco. Malgranda estas la nombro de tiuj poemoj, sed ili prezentas unu el tiaj trezoroj, kies destino estas briladi por ĉiam en la historio de la bulgara spirita kulturo.

Antaŭ la nova vivo en la patrio por ĉiam restas genufleksinte la pura, sonora verso de Liliev. Kiel la poeto mem estas skribinta:

Torento haltos ĉe ĝia progres',
la firmament' ridetas en ebrio,
kaj genufleksas via hela vers'.

Nikolaj Liliev

MILITO

La steloj ekpalas sur
frostfirmamento.
Malarde rigardas la lun' en insid'
kaj tremas la koro pro morta eksento:
milit'.

Kaj lacaj soldatoj ĉe l' vojo ekhaltas,
lulate de l' sankta kampara konfid',
kaj vorton alarman ripetas mallaŭte:
milit'.

En sonĝ' ili sian alvenon jam festas,
en landon beatan — o, dolĉa ekrid' —
de viv' sentempesta — kaj kie
forestas:
milit'.

Sed frosta aŭtuna vespero forblovas
senbrue ĉi-sonĝon, kaj en la spirit'
de ili malĝoj' sen konsol' sin
enŝovas:
milit'.

Tralarme la frosta ĉiel' malvualas
krepuskan vualon de luna rigid'.
Minaca terur' super' ili fatalas:
aŭtuno, kaj mort' kaj milit'.

Tradukis: Asen Grigorov

AL LA SUNO

En la valoj bukla flam'
foren ŝutas palajn rozojn, —
suno, dorme vi ripozas
en palac' fabela jam.

Ni-idar' de sort' malhela —
vojon vian sekvas — kaj
ni direktas al ĉielo
petojn varmajn en malĝaj'!

Super paca la akvar'
vi malplektas buklojn orajn —
kaj tra kampoj, bonodoraj
flamas via brila klar'.

La altaĵoj ekdivenas
nian krion aŭ nebul' —
kaj flugiloj ĝin ekprenas
ĝin karesas milda lul'.

En animoj pro fervor'
sonas dolĉa melodio —
kaj brulantaj en ebrio
revas ni pri belaŭror'.

Tradukis: At. Lakov

Ŝ I A R E S P O N D O

La blonda virino staris tute konsternita. Kun peno ŝi reposedis siajn pensojn. Ŝi volis kompreni, kio okazis.

Ŝi ĵus revenis de la malsanulejo. Hodiaŭ ŝi havis tiel komplikitan operacion. Laca ŝi ĵetis sian mantelon, rapide sin lavis kaj ekuŝis sur la divanon. Ŝia edzo eniris la ĉambron, sidiĝis apud ŝi flata:

— Ni devas iom paroli.

Multajn tagojn ŝi atendis ĉi tiujn vortojn. Ŝia laco forpasis. Fine li klarigos kion li travivas, kion li kaŝas tiom da tempo en sia animo ne dividinte ĝin kun ŝi. Ŝi vidis, eĉ ŝi rememoris, kiam komenciĝis la neklariĝebla ŝanĝo en li. Tiun tagon li ricevis leteron de fremdlando.

— Kiu rememoris pri vi — ŝerce demandis ŝi.

La viro estis forleginta la leteron, tenis ĝin en mano ankoraŭ malfermita. Li respondis eviteme:

— Ĉu malmulte da amikoj mi havis tie.

Li faldis la folion kaj enpoŝigis ĝin. Tie — tio ĉi signifis Francion, kie li travivis la maltrankvilajn tagojn dum la milito kaj prisuferis multon. La edzino ne esprimis plu scivolemon... Sed ŝi rimarkis. Ĉio komenciĝis de tiam. Sentrankvileco plenigis liajn okulojn. Ombro malserenigis lian vizaĝon. Ankoraŭ pli malbona por ŝi estis alio kaj ŝi konsciis eĉ dolore klare: unuafojon en ilia kuna vivo li ne kundividis sian alarmon. Ne nur ne kundividis ĝin. Li faris ĉion por kaŝi ĝin. Viciĝis amaraj, senĝojaj tagoj. Ĉiam ili estis ne nur geedzoj, kunirantoj en la vivo, sed ankaŭ kamaradoj kaj tio estis la plej bela ĉe ili. Per unu rigardo ŝi vidis kaj komprenis ĉion, kion

li travivas. Per unu rigardo li penetris ĝis la plej intimaj ŝiaj travivaĵoj. Parencaj kaj proksimaj ilin kreis la komuna batalo dum la pasinto, la komunaj idealoj, parencaj kaj proksimaj ili ekiris en la nova vivo. La konfido de unu al alia kronis iliajn rilatojn. Depost tiu tago io nova, neordinara eniĝis inter ilin kaj premadis ŝian koron. Oni ne povas diri, ke ŝi ĵaluzis kaj perdis certecon je la fundamentoj de sia edziniĝo. Por ŝi la ĵaluzo estas nekonata. Neniam ŝi submetas sin al tiu ĉi emocio. Ĵaluzas, ŝercis iam la feliĉa juna virino, la heroinoj el la banalaj romanoj, sed virinoj kiel ŝi konstruas sian feliĉon sur neskiebla konfido en la homo, kiun ili amas. Ŝi estis nur amare tuŝita, ke la amato kaŝas ian alarmon, kiun li povus dividi kun ŝi. Ĉu li ne kredis ŝiajn fortojn. Tamen la sekvan tagon ŝi iris ree en la malsanulejon plenigita per la kontento, ke ŝi estas bezona al iu. Ĉu li indulgis ŝin, aŭ ne kredis ŝian elteneblecon? Ŝi atendis tagon post tago. Ŝi volis kompreni.

Fine li sidiĝis apud ŝin kaj diris la atenditajn vortojn. Ŝi eksentis sin feliĉa: apud ŝi sidiĝis ne nur la edzo, sed ankaŭ la proksima kunulo. Pri tio parolis la mildeco en liaj vortoj, la malkaŝa rigardo, plena je konfido kaj sincero. Delonge ŝi konis ĉi tiun rigardon. Tiel rigardis la junulo, kiu staris vice kun ŝi antaŭ la tablo kun la ruĝa kovrilo kaj etendis brakon por ricevi sian komsomolan karton. Per ĉi tiu rigardo li renkontis ŝin dum la timiga nokto, jarojn pli malfrue, kiam ŝi, morte minacita, ekfrapis lian pordon kaj diris la priparolitajn vortojn, kiuj devis asekuri al ŝi azilon. Tiel li ekrigardis ŝin unu ta-

gon, kiam minacita mem, devis malaperi kaj alflustris la neforgeseblon:

— Fidu! Atendu min!

Tio estis la rigardo de konfido kaj sincero de la kamarado kaj la amato. La jaroj ne malgrandigis la mirindan forton de tiu rigardo. La juna virino konjektis, ke ĉio reekiros kiel iam kaj eksentis deprimiĝon pro feliĉo. Tamen apenaŭ la edzo ekparolis kaj ŝi konfuziĝis. Kion li diris al ŝi? Ĉu tion ĉi ŝi atendis? Konsterniĝinta, konfuziĝinta kiel homo, subite falinta en profundan akvon, ne sciante naĝi, serĉis kun plena streĉo sin kapti je io. Ŝi ne trovis la savan apogon. Ŝi vidis, ke li ekiris al la pordo kaj antaŭ pripensi, ŝi ĵetis sin al li. Frenezaj, nekonataj elementoj, kiuj dormetis ne sciate kie en ŝi, eksplodis:

— Vi eliras, ĉar vi hontas rigardi min!

La viro haltis.

— Maria!

Kaj liaj okuloj, plenaj je mirego, esploris ŝin, kvazaŭ nun malkovris ŝin.

— Mensogulo! — kriegis ŝi. — Hipokritulo! Tiom da jaroj vi pasigis en mensogo. Foriru! Mi ne volas revidi vin. Ĉio inter ni estas finita.

Li ekiris, avertinte sindetene:

— Mi revenos, kiam vi retrankviliĝos. Mi volus ankoraŭfoje aŭdi, kion vi diros.

— Mi diros, ke vi estas senhonta! — kriegis ŝi post li.

La pordo fermiĝis, kaj la koleriĝinta virino tuj silentiĝis.

— Kiel la ĵaluzulino el la banala romano. Ĝuste kiel la rabiinta ĵaluzulino, posedantino de ornamaĵoj, de domoj kaj de edzoj. Ŝi aŭdis akre, klare kvazaŭ iu alia parolis apud ŝi.

Ironia, pririda pritakso altrudis sin en ŝia menso. La juna virino, staris senhelpa kaj konsterniĝinta inter la certeco ke ŝi faris la farendon kaj la sento de ĉiam pli ekposedanta ŝin honto. Ŝi sidiĝis ĉe lian skribtablon,

metis kapon en siajn manplenojn. Kaj nun ĉio, kio okazis tiun ĉi tagon inter ŝi kaj ŝia edzo, reliefe elnaĝis en ŝia konscio...

Li venis apud ŝin sur la divanon kaj flate diris:

— Ni devas iom paroli.

Angoro premis lin.

— Vi ne scias iujn okazintaĵojn en mia vivo. Mi konsideris, ke ne estas necese alarmi vin. Sed jen la cirkonstancoj postulas, ke mi sciigu al vi. Ĝi rilatas mian vivon en Francio...

Antaŭ lia kaptiĝo kaj enigo en la malliberejon, li estis pafvundita. Kaj en la malgranda montara vilaĝo kun ŝtondomoj li trovis azilon en pajlejo. Policanoj kaj soldatoj priserĉis ĉiun domon. Kaj li kun streĉo rampis al la pajlo en sia kaŝejo, kaj senkonsciiĝis. Tra la duondormo li aŭdadis kriojn, bojon de hundoj, pezajn paŝojn, tinton de armilo. Ankaŭ flustron, plena je sindono:

— Ne timu, ili ne eniros ĉi tien. Paĉo diros al ili, ke ĉi tio estas mia ĉambro kaj ili ne eniros.

Malferminte okulojn, li vidis sin en mallarĝa, luma junulina ĉambro. Apud li sur la pura lito sidis Monik, eta, delikata, kun blanka haŭto, kun alligita nigra hararo kaj kun varmaj nigraj okuloj. Ekstere jam estis trankvile, la persekutantoj estis foririntaj. Sed li ne havis fortojn eĉ moviĝi. Li povis nur prononci ian dankon al la knabino kaj denove li estis sinforgesinta.

Duonon da jaro pasigis la vundito en la izolita montara vilaĝo. La delikata sindono de Monik venkis la morton, kiu ne unufoje aperis super lian liton. Li kutimiĝis kun ĉi tiu sindono. Tri tagojn antaŭ ol aliri al la francaj kamaradoj li iĝis edzo de Monik.

Poste li enfalis en la malliberejon, kaj poste venis la fino de la milito. Feliĉa, ĝoja, la viro revizitis la mon-

taran vilaĝon kun intenco neniam forlasi ĝin. Jes, li rememoris pri la patro kaj pri ĉiuj proksimuloj, kiujn lasis tie. Li rememoris ankaŭ pri la junulino — kamaradino kaj amatino, kun kiu ili ambaŭ ricevis la komso-
molajn kartojn kaj kune sin ĵetis en la batalon, sed io solida jam ligis lin kun la vilaĝo en la franca montaro. En la hejmo de Monik lin renkontis ŝia sola patro. La saventino kaj la edzino jam ne estis en ĉi tiu mondo. Ne kompreneble povis klariĝi la maljunulo, kio estis okazinta. Dujara, bruna knabeto kun flama rigardo kaj sonora voĉeto tiris la maljunulon, kaj li rapidis post la knabeto, kvazaŭ forkuris de la fremdulo. Fremdulo sentis sin vidviĝinta edzo en la hejmo, kiu devis fariĝi lia kaj li forveturis, plena je angoro...

La blonda virino sidis antaŭ la skribtablo, kaŝinte vizaĝon en siaj manplenoj.

— Poste — sin demandis ŝi.

Kaj denove eksplodis.

— Poste komenciĝas la mensogo!

Ŝi stariĝas, marŝas en la ĉambro kaj konfirmas maltrankvile:

— Jes, komenciĝas la mensogo. Ĉar li renkontis min kaj nenion konfesante, ligiĝis kun mi feliĉa, ke ree trovis min. Kaj nun venis la letero kaj li devis ekparoli. Apenaŭ nun!

Ŝi ripetas:

— Apenaŭ nun!

Kaj ŝi sentas, ke senfortiĝas. Sidiĝas ree.

— Kiam aperas la infano! — flustras ŝi. — La infano, tiu, la bruna, kiu estis kurinta ĉirkaŭ la maljunulo, kun la flama rigardo kaj la sonora voĉeto. La eta, bela estaĵo, kiun la maljuna homo ne volis doni, por konservi ĝin por si men en sia soleca vivo.

Ŝi rigardas supren, ien malproksimen kaj ripetas:

— Lia infano!

En ŝian koron versiĝas mildeco. Lia! Ŝi estas profunde ligita ne de hodiaŭ kun ĉio, kio estas lia. Kion faras ŝi, al kiaj fortoj sin fordonas? Kia estas li por ŝi? Ĉu ŝi perdis sian kredon en li? Ankoraŭ pli forte agitas ŝin la penso pri la infano, sed nun venas ankaŭ alio, tute klara kaj pli emocia — la penso pri liaj turmentiĝoj hieraŭ, kiam ekparolis pri la infano, kaj hodiaŭ, kiam devas defendi ĝin.

La viro iris en la ĉambron.

« Mi esperas, ke vi retranskviliĝis, retranspensis ĉion. Ŝajne sindetena, li estas en turmenta streĉo. Ŝi konas lin tia en la plej pezaj minutoj de ilia vivo. Kaj kvazaŭ nun ŝi malfermis okulojn kaj vidis ĉion en nova lumo. Minacita kiel iam de morta danĝero, apud ŝi venis batala kamarado. Ŝi aŭdas la signaldiron:

— Mi ne povas forlasi mian infanon. Vi komprenis. La maljunulo mortis kaj ĝi restis sola.

Ŝi rigardas la karan vizaĝon kaj diras:

— Vi ne devas forlasi ĝin.

— Mi? — konfuzite komencas li. — Mi neniam pensis nur por mi mem... sen vi... Mi konsideris, ke ni povas decidi ambaŭ, ĉar... ĉi tio estis... nia vivo... kaj ĝi naskiĝis de nia vivo...

En ŝiaj okuloj ekbrilis kareso.

— Jes, ĝi estas naskiĝinta de nia vivo kaj ĝi estos nia. Ankaŭ mi tiel opinias.

La vizaĝo de l' viro ekhelis. Li ekrigardis la virinon kun varmece kaj mildeco, nenion parolinte, altiris ŝin al si kaj longe tenis ŝin en sia ĉirkaŭpreno.

El bulgara: Steki

Gesamideanoj, preparu vin por la nova organiza konkurado. Legu la kondiĉojn en la januara n-ro de BE!

SUPERA DISTINGIGO DE ESPERANTISTOJ

(daŭrigo de n-ro 7-8)


Ĉi sube ni daŭrigas la publikigon de la nomoj de esperantistoj distingitaj per ordenoj de la Prezidentaro de la Parlamento. Tiu fakto estas tre grava por ni, ĉar tio estas rekono de la socia rolo de la esperantistoj kaj de la E-movado kaj prezentas de si mem gravan kaj tre efikan propagandan materialon. Pro tio ĉiu societo kaj aparta esperantisto devas sciigi al la redakcio la nomojn de la honoritaj gesamideanoj.

23. Jordan Pavlov (Plovdiv)	—	«Popola respubliko Bulgario» I grado
24. Slavĉo Vasev (Sofio)	—	«Popola respubliko Bulgario» II grado
25. Ilija Kjuljovski (Sofio)	—	«9-a de Septembro 1944» I grado
26. Nikola Zgurov (Plovdiv)	—	«9-a de septembro» I grado
27. Trajana Petkova (Sofio)	—	«9-a de septembro 1944» II grado
28. Angel Ĉikov (Sofio)	—	«9-a de septembro 1944» II grado
29. Konstantin Bujukliev (Sofio)	—	«9-a de septembro 1944» II grado
30. Nikola Merĝanov (Plovdiv)	—	«9-a de septembro 1944» II grado
31. Ivan Bataklijev (Plovdiv)	—	«9-a de septembro 1944» II grado
32. Violin Oljanov (Sofio)	—	«9-a de septembro 1944» III grado
33. Josif Eŝkenazi (Plovdiv)	—	«9-a de septembro 1944» III grado
34. Ĥristo Ŝiŝkov (Plovdiv)	—	«9-a de septembro 1944» III grado
35. Stefan Margaritov (Plovdiv)	—	«9-a de septembro 1944» III grado
36. Ĥristo Petrov (Plovdiv)	—	«9-a de septembro 1944» III grado
37. Ĥristo Gorov (Sofio)	—	«Por popola libero 1941—1944» I grado
38. Spiro Krâstin (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» III grado
39. Georgi Gjaurov (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» II grado
40. Georgi Katanov (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» II grado
41. Krâstjo Sofroniev (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» II grado
42. Elena Veselinova (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» II grado
43. Donka Kakalova (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» II grado
44. Angel Boĵanov (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» II grado
45. Simeon Panajotov (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» II grado
46. Stojanka Ĵeljazkova (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» II grado
47. Todor Iŝev (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» II grado
48. Aleksandâr Ivanov (Plovdiv)	—	«Por popola libero 1941—1944» II grado

- | | | |
|---|---|--|
| 49. Kostadin Apostolov (Plovdiv) | — | «Por popola libero 1941—1944»
II grado |
| 50. Asen Filev (Plovdiv) | — | «Por popola libero 1941—1944»
II grado |
| 51. Dimitâr Milev (Plovdiv) | — | «Por popola libero 1941—1944»
II grado |
| 52. Asen Barutčiev (Plovdiv) | — | «Por popola libero 1941—1944»
II grado |
| 53. Dimitâr Gramadnikov (Plovdiv) | — | «Ruĝa standardo de la laboro» |
| 54. Aleksandâr Gerasimov (stacio Septemvri) | — | «Popola ordeno de la laboro» (ora) |
| 55. Vladimir Rangelov (Plovdiv) | — | «Popola ordeno de la laboro» (ora) |
| 56. Stoil Gjurĝikliev (Plovdiv) | — | «Popola ordeno de la laboro» (ora) |
| 57. Angel Stamenov (Plovdiv) | — | «Popola ordeno de la laboro» (ora) |
| 58. Georgi Trajkov (Plovdiv) | — | «Popola ordeno de la laboro»
(arĝenta) |
| 59. Haim Levi (Sofio) | — | «Popola ordeno de la laboro»
(bronza) |
| 60. Georgi Popov (Blagoevgrad) | — | «Kiril kaj Metodij» I grado |
| 61. Radoslav Gornenski (Sofio) | — | «Kiril kaj Metodij» I grado |
| 62. Atanas Lakov (Sofio) | — | «Kiril kaj Metodij» II grado |
| 63. Ivan Georgiev (Plovdiv) | — | «Medalo por partopreno en la septembra ribelo 1923»
(daŭrigota) |

Todor Pavlov
Prezidanto de Bulgara
Akademio de la Sciencoj

ESPERANTO EN LA MALLIBEREJO



Antaŭ la tempo, kiam mi eniris duan fojon en malliberejon, la demando pri Esperanto neniel okupis min kaj mi pensis kiel multaj aliaj: «Morta lingvo... La tempo, uzata por ĝia lernado, estas vane perdata, speciale rilate al la laboristaro». La unuan fojon antaŭ mi metis tiun ĉi problemon en la aŭtuno de 1925 unu kamarado — politika malliberulo, se mi ne erarus eksinstruisto, en la Distrikta Malliberejo de urbo Lom, kien oni sendis min por kelka tempo. Li deziris aŭdi la opinion de mi kaj de la kamaradoj el la Centra (Sofia) Malliberejo pri Esperanto kaj kom-

preneble, aŭdinte ĝin, li ne konsentis kun ĝi, sed petis min sendi al li el Sofio gramatikon kaj literaturon de Esperanto.

La eventoj, kiuj ekestis post tio en la Centra Malliberejo en ligo kun niaj protestoj, entreprenitaj demonstracioj, ktp, malhelpis min plenumi tiun komision kaj la demando pri Esperanto denove ĉesis ekzisti por mi.

Tamen dum la vintro de 1926-1927 granda grupo da junaj laboristoj, gimnazianoj kaj studentoj havigis al si unu aŭ du lernolibrojn kaj komencis fervore lerni la lingvon. Ili influis ankaŭ min per sia junula entuziasmo kaj — mi memoras — la trio po de nia komuna ĉelo (mi, D. I-v kaj Sv. K-ev) ekinteresiĝis por vidi fine, kiun miraklon prezentas tiu ĉi artefarita lingvo.

Ni prenis lernolibrojn, vortaron, literaturon kaj — post unu semajno, fakte, ni povis jam uzi (legi) preskaŭ libere Esperanton. Evidente por tiuj, kiuj ne konas la francajn, latinajn, germanajn kaj slavajn radikojn, la ellernado de la lingvo, eĉ parte ne povus efektiviĝi dum unu semajno, ankaŭ ne dum unu monato. Sed tamen la lingvo estas tiel simpligita kaj tiel facila, ke eĉ laboristoj, posedantaj neniun alian fremdan lingvon, nur en daŭro de kelkaj monatoj, per kelkhora okupiĝo, progresis tiom, kiom ili ne povus progresi dum tutaj jaroj lernante la «vivantajn» lingvojn. Krome, kiam la orelo komencas alkutimiĝi al la lingvo, ĝi manifestiĝas kiel sufiĉe belsona kaj dolĉa lingvo kaj al mi persone eĉ la versaĵoj en Esperanto komencis ne ŝajni ridindaj. Estas interesa la sekanta fakto. Tiel okazis, ke mi ne estis leginta la originalon de la novelo de Elin Pelin «La familio Gerak», kaj unufoje mi ĝin legis en Esperanta traduko. Eble estus forte dirite, sed en la traduko estis perdita preskaŭ nenio de la arteca valoro de tiu bela verko de l' talenta beletristo,

kaj mi englutis kaj travivis la libron kvazaŭ ĝi estus la originalo mem. Tio ĉi solvis por mi definitive la demandon: se Esperanto povas transdoni, ne profanante ilin, verkojn kiel «La familio Gerak (poste mi legis ankaŭ bonajn tradukojn el Botev, kaj nun — jam el Smirnenski), tio ĉi signifas, ke ĝi ne estas morta lingvo, ĝi vivas — kaj ĝi ja devas vivi, estante krom tio tiel facile lernebla.

La demando ricevis definitivon, kiam estiĝis evidente, ke la laboristoj en USSR kaj ĝenerale la tutmonda laboristaro favoras Esperanton, dum la burĝaj medioj kaj registaroj komencas rigardi ĝin kun suspekto aŭ eĉ rekte malamike, kiel lingvon, kiu ĝuste povus servi pleje la laboristojn kaj iliajn internaciajn organizaĵojn, kongresojn, gazetojn kaj batalojn.

Ĉe mia triafoja eniro en la malliberejon en 1929 mi trovis tie laboristojn kaj gimnazianojn en la malliberejoj de Plovdiv kaj de Sliven, lernantajn Esperanton, kaj iuj el ili informis min, ke Esperanto estas lernata ankaŭ en la malliberejoj de Ŝumen kaj de Varna. Mi persone dum la lastaj du jaroj, pro diversaj cirkonstancoj, estis leginta plu neniun paĝon en Esperanto. La samon mi povus aserti ankaŭ per kelkaj aliaj kamaradoj, kiuj estis sufiĉe progresintaj en la lingvo. Unu el la kaŭzoj por tio estis sendube ankaŭ la manko de nova kaj interesa por la laboristoj literaturo en Esperanto kaj ĝenerale la tre malmultaj kaj ne organizitaj grupoj de la kamaradoj, estantaj ekster la malliberejoj, por havigo de pli bona lernolibro kaj ankaŭ de tradukita belarta, pedagogia, scienca kaj ĉefe sociala esperantlingva literaturo al la malliberejoj.

(Verkita en 1931 kaj aperinta en bulgara lingvo en la gazeto «Mejdunaroden ezik», n-ro 4, 1931. Ni represas ĝin okaze de la 70-a datreveno de la naskiĝo de la aŭtoro).

Ruse. Dum la lastaj jaroj la fervojistoj en Ruse ĉeestis multajn kortuŝitajn renkontojn de eksterlandaj somerumantoj kaj ekskursantoj kun la esperantistoj en la urbo. Grupoj da junaj esperantistoj preskaŭ ĉiuvespere atendis la alvenantajn internaciajn vagonarojn. Laŭ la flagetoj kun verdaj kvinpintaj steloj, simbolo de paco kaj amikeco inter la popoloj, la dommastroj, konataj kaj nekona- taj gastoj de proksimaj kaj malprok- simaj landoj facile interkonatiĝis, kortuŝe renkontiĝis kaj adiaŭis. Tiuj renkontoj, tiuj paroloj en internacia lingvo dum kiuj la gastoj kaj la dom- mastroj bonege interkompreniĝis, ve- kis en multaj fervojistoj deziron lerni Esperanton. La ĉefo de la centra stacidomo Dimitâr Gâbenski kaj la prezidanto de la sindikata komitato priatentis tiun ĉi deziron kaj dispo- nigis ĉion necesan por malfermo de la Esperanto-kurso ĉe la stacidomo. Ĉirkaŭ 30 fervojistoj dum la mezo de oktobro k. j. komencis lerni la ling- von. Ĉiuj kursanoj jam estas abonan- toj de la ĉina gazeto «El popola Ĉi- nio» kaj hungara «Hungara Fervoji- sta Mondo». La kursanoj komencis korespondadon kun eksterlandaj ami- koj kaj de la ricevitaĵoj leteroj, poŝt- kartoj kaj aliaj interesaj materialoj preparas murgazetojn. Ili intencas ankaŭ fondi apartan fervojistan so- cieton.

J. Kalinov

Polski Trâmbeș. La fruktodona la- boro por Esperanto en la mezlernejo de Polski Trâmbeș daŭras ankaŭ dum tiu ĉi lernojarro. Esperanto estas in- struata al ĉiuj gelernantoj de naŭa «A» klaso, unu horon ĉiusemajne. No- va kurso estis malfermita ankaŭ por

pli ol 20 geinfanoj de kvara klaso. Daŭras la laboro de la pasintjara kurso kun la lernantoj el la deka kaj dekunua «A» klaso.

La kooperativa jurnaleto de la vi- laĝo publikigis antaŭ nelonge salut- leteron de esperantistoj el Omsk, So- vetunio. Responde ni sendis leteron, subskibitan de ĉiuj instruistoj.

Ĥristo Manolov

Sofio. La gvidado de la esperantis- taj kursoj estas respondeca laboro. Ĝi bezonas ne nur bonan posedon de la lingvo, sed ankaŭ specialan in- struadon. Ĝi korespondas al ĉiuj le- ĝoj de la instruarto, egale valida por iu ajn instruisto. Dank' al la fervora klopodo de nia kamarado Boris Si- meonov «La domo de la instruisto» ĉe la Sindikato de la kulturklerigaj laboristoj prenis tre gravan decidon. Havante antaŭvide la kreskantan in- tereson al Esperanto, ĝi prenis sub sian aŭspicion unu specialan kurson por kursgvidantoj. Ĝi estas gvidata de kamarado Ivan Sarafov, eksin- struisto kaj aŭtoro de lernolibroj. La kurso jam ekfunkciis kun ĉirkaŭ 50 gekursanoj. Apud la kandidatoj por kursgvidantoj sidas grupo da pro- gresintoj, ne havanta kuraĝon anko- raŭ pretendi esti kursgvidantoj. Es- tas ankoraŭ unu, tria grupo. Ĝi estas la grupo de la komencantoj, kiuj de- vas esti instruotaj. Ili formas la eks- perimentan bazon de la kurso. La kandidatoj por kursgvidantoj devas preni kun ili lecionon post leciono, laŭ plano. Unu post alia la kandida- toj havos la eblecon montri sian ins- trukapablecon. La lecionoj daŭras 45 minutojn. Poste, dum proksimu- me saman tempon, la ceteraj kandi- dato-kursgvidantoj faras siajn kriti-

kajn notojn. Dum la tuta tempo oni parolas nur esperante. La kurso daŭros 7 monatojn, unufoje semajne. Ĝi finiĝos per ŝtata ekzameno kaj donos al la gekursanoj la rajton oficiale gvidi kursojn.

Evidente, Esperanto malrapide eliras el la periodo de la aŭtodidakteco kaj preparas sin fariĝi ordinara instruobjekto en la gimnazia programo.

D-ro Stefan Kadiev,
respondeculo pri la kursoj en s-to «M. Gorkij»
— Sofio

Levski. La 2-an de novembro en la gimnazio de urbo Levski okazis granda kunveno por la gelernantoj. Prelegis docento Ĥristo Marinov ĵus reveninta el la skandinavaj landoj. Pli ol 200 lernantoj kaj iliaj instruistoj aŭskultis la vojaĝimpresojn de k-do Marinov pri la malproksima norda Svedio. Li substrekis interalie, ke kvankam li scipovas aliajn fremdajn lingvojn, per Esperanto li pli facile plenumis ankaŭ sian fakan laboron pri geografio.

Li rekomendis al la lernantoj lerni la internacian lingvon. La prelego estis ilustrita per lumbildoj.

K. Uzunova

St. Dimitrov. La esperantista vivo en nia societo «Marek» daŭras laŭ la akceptita plano. Ĉiuĵaŭde ni kunvenas. Pasintan monaton estis aŭditaj tri prelegoj: de k-do Boris Drenski «Mia vizito de Belgujo» kaj «La impresoj de 45-a Universala Kongreso en Bruselo» kaj de k-do Ivan Smokov «Per Esperanto tra Bulgario» okaze lian partoprenon en la esperantista someruma ekskurso. La prelegoj estis aŭskultitaj grandatente. K-do Drenski rakontis pri sia renkonto kun korespondantino en Belgujo post 32-jara korespondado, pri la belecoj de Belgio kaj pri la bona akcepto flanke de antverpenaj geesperantistoj. Li fa-

ris paroladon antaŭ la antverpenaj gesocietanoj kiuj akceptis lin tre amike. Konklude, ni komprenis, ke la esperantistoj ĉie luktas kaj laboras kontraŭ la milito. De k-do Smokov ni komprenis pri la unua esperantista ekskurso aranĝita de Bulgara Esperantista Asocio.

Nia societo malfermis kurson por komencantaj civitanoj gvidata de k-do B. Drenski. En ĝi partoprenas 18 gekursanojn.

En vilaĝo Barakovo, la sindona ano de nia movado Dobri Gorov aranĝas esperantistan societon kaj malfermas kurson.

Iv. Dobrovski

TRA LA GAZETARO

«**Zdrave**», eldono de Bulgara Ruĝa Kruco (julio 1960) — skizo «Fratoj, Marĉiu marŝas» de K. Vodeničarov, pri la helpo de la bulgaraj esperantistoj — poŝtistoj al unu knabeto el Pollando malsana pro polimielito kaj kuracata per «nivelin».

«**Haskovska tribuna**» (20. IX. 1960) — informo «Renkontiĝo de esperantistoj» de Georgi Idakiev.

«**Transportna iskra**», Sofio (30. IX. 1960) — artikolo «Printempo» plivastigas sian agadon» de P. Dimitrov.

La sama ĵurnalo (8. X. 1960) publikigas informon pri la malfermo de la E-kurso.

«**Narodno delo**», Varna (14. X. 1960) — informo pri malfermita kurso ĉe la ekonomia mezlernejo.

«**Dunavski konservopromiŝlenik**», Ruse (25. X. 1960) — artikolo «Unuaj fruktoj de nia internacia amikeco» de J.D.K.

«**Trudov podem**», Polski Trâmbeŝ (5. XI. 1960) publikigas leteron de esperantistoj el urbo Omsk, USSR al la esperantistoj.

«**Septemvri**», Stara Zagora (10. XI. 1960) — informo de Iv. Nestorov «Vespero pri Estonio».

EKSKURSA SOMERUMO SUB LA VERDA STANDARDO

Nia esperantista asocio unuan fondon ĉijare aranĝis specialan grupon en la kadroj de la sindikatoj. Je la 2-a de septembro 40 viglaj geesperantistoj el diversaj lokoj de la lando ekvojaĝis sub la verda standardo al la sofia stacidomo. En Vidin nin renkontis fervoraj geamikoj, kiuj montris al ni la vidindaĵojn de la apudmara urbo. La luksa vaporŝipo «Georgi Dimitrov» donis al ni la eblecon dum 4 tagoj ĝui la belecon de la surdanuba naĝado. La kamaradoj el Ruse montris al ni la «Ponton de la Amikeco», la belegan parkon «Lipnik» kaj la muzeon «Baba Tonka». En Varna, en la loĝejo de la sindikatoj, la grupo sin sentis kvazaŭ hejme. Bonege trapasis la sunriĉaj tagoj sur la strando de la «Oraj Sabloj». Unu vesperon nin gastigis gekamaradoj el la societo de Varna. Okazis amuz-vespero. Eksonis esperantaj kantoj, oni aŭdis improvizitan programon.

La karavano ekvojaĝis per la vaporŝipo al Nesebâr, flirtigante la verdan standardon antaŭ la restintaj sur la bordo geamikoj. En la luksa restadejo de la Sindikatoj en Nesebâr k-do R. Triĉkov rakontis antaŭ 300 somerumantoj kiamaniere li travojaĝis la plej malproksimajn landojn de la mondo — Argentinon,

Brazilon, Afrikon, per la flugiloj de Esperanto, per la helpo de fidelaj geesperantistoj. Sekvis amika renkontiĝo en Burgas. La direktoro de la restoracio «Balkanturist» estas esperantisto. Eksonis la esperantaj kantoj. La orkestro ekludis muzikon je honoro de la esperantista grupo. La laboristaro de la kabla uzino «Vasil Kolarov» amike renkontis la grupon kaj multaj laboristoj promesis lerni Esperanton.

La vagonaro forportis la grupon al Plovdiv, ĝuste antaŭ la malfermo de la foiro. K-do Bataklijev jam antaŭokupis la loĝejon. Amika renkonto en la klubo de la plovdivaj esperantistoj montris la belecon de nia movado. Sekvis interesplena vizito de la foiraj palacoj ĝis plena elĉerpiĝo de la fortoj kaj forta ekdeziro reveni hejmen.

Dum la tuta tempo en la grupo regis la amika esperanta spirito, sonadis la esperantaj kantoj. En la vagonaroj, vaporŝipoj, restadejoj la homoj povis vidi la vivantan parton de unu progresema movado, aspiranta la pacon kaj la internacian kompreniĝon.

Ni rekomendas elkore similajn ekskursajn somerumojn dum la estonteco.

Stefan Kadiev

INTERNACIA SOLIDARECO

Sekvante la imitindan ekzemplon de s-ino Jadviga Tylkova el Pollando (vidu «Bulgaran Esperantiston» № 7-8, paĝo 29) la esperanta sekcio «Amikeco» en urbo Rostov—Don 6 USSR, sendis al Bulgara esperantista Asocio kiel «brikojn» por la konstruota Esperanto-domo en Sofio 5 ekzemplerojn de la libro «Por nova afero nova maniero» kaj 4 ekz. de la

libro «Mi volis viziti lernejon». Ni esprimas nian dankon al la Rostovaj gesamideanoj!

Ni ĝoje rimarkigas la ricevon de brikoj el malproksima oriento. Ni ricevis por nia Esperanto-domo donacon unu ekzemplero de «Per Gint» de Ibsen de nia ĉina amiko Armand Su. Ni kore dankas.



Jon Luka Karaĝale
RUMANA FERVOJO

Du amikoj, Nika kaj Gika, sidas ĉe tablo en bierejo kaj mallaŭte interparolas pri io. La pordo malfermiĝas brue kaj eniras tre ĝojema nova kvietaj homo pli malpli juna. Eble li venas el alia trinkejo en kiu li restadis. La nova veninto rigardas la okupatajn tablojn kvazaŭ serĉante konatulon kaj fine haltigis la rigardon al tiuj du amikoj. Per decidaj paŝoj li venas rekte al ilia tablo. La nova kliento balbutas silabojn kaj la mallaŭtajn li eĉ neglektas.

La kliento: — Saluton, paĉjo!

Nika kaj Gika: Saluton!

K: — Ĉu vi permesas al mi?

N: — Bonvolu! Jen!

K: — Ĉu mi ne ĝenas vin?

G: — ... Nne!

K: — Ĉu vi interparolas ion sekre-
tan?

G: — ... Nne!

(silento)

K: — Frato! ... Ĉu estas malfrue?
... Ĉar mian horloĝon mi donis por
riparo.

N: — Kvarono antaŭ la unua.

K: — Ĉu ĝi bone funkcias?

N: — Laŭ la stacidomo.

K: — Nun Marinja devas esti...
kioma vi diris?

G: — Unua sen kvarono.

K: — Inter Gerganj kaj Konceŝtj...
Mi lasis ŝin forveturi kune kun la
ĉefo... (frapas sur la tablon). Bone,
frato, ĉu mi nenion trinkos? Donu al
mi glason da biero!

(Nika kaj Gika sin rigardas unu la
alian demandante per la okuloj, kiu
estas la amiko).

La amiko (alfrapas sian glason kun

la glasoj de l'amikoj kaj trinkas) —
Pardonu... momenton. (Li foriras).

G: — Kiu estas la amiko? Ĉu vi ko-
nas lin?

N: — Ne!

G: — Li estas amuzega!

N: — Tre amuzega, tute amuzega!

La amiko (revenas al sia loko) —
Frato, ĉu estas malfrue? Kioma po-
vas esti?

N: — Unu kaj dek minutoj.

K: — Nun ili estas ĉe la stacio ĉe
Titu. Ŝi manĝas la bulajojn de sinjo-
rino Maria, do...

G: — Kiu paĉjo?

K: — Marinja, ĉu mi ne diris al vi?
... Knabo! Ankoraŭ unu bieron!

N: — Frato, kiu estas tiu ĉi Mari-
nja? Komprenigu nin!

K: — Ĉu? Vi ne scias?

N: — Ne.

K: — Mia edzino, frato!

G: — Bone... paĉjo, ĉu vi ne timas
lasi sola ŝin dum la nokto sur fervojo?

K: — Sed mi jam diris al vi, ke ŝi
ne estas sola. Ŝi estas kun la ĉefo!

N: — Bone, bone... ni komprenas,
sed... fine... ĉu ne... virino sola...
dum la nokto.

K: — Sen zorgo! Ejo aparta... ili
eniras, estingas la lumon, malsupre-
nigas la kurteneton kaj ŝlosas la por-
don... Ejo aparta (okulumas). Ŝi po-
vas dormi ĝis post Filiaŝo. Vagonaro
163... estas bonega por vi. Vagonaro
163... (la du amikoj ridas). Kioma
estas nun?

N: — Unu kaj duono.

K: — Ili foriris el Titu, pasis ankaŭ
Matasaru. Marinja nun dormas.

G: — Sed la ĉefo?

K: — Kaj la ĉefo... pardonu... momenton (li eliras).

N: — Interesa ullo...

G: — Vera edzo!

N: — Pacience, ni vidu kia persono estas tiu ĉi Marinja?

K (revenas al sia loko): — Sola mi ne lasis ŝin! Oni scias! Juna virino ne devas promeni sola... estas azenoj, sentaŭguloj kaj...

G: — Sed ŝi estas beletulino?

K (ekridas): — Beletulino! Marinja — beletulino! Kion vi parolas, sinjoro? Mi bedaŭras... Belulino, sinjoro, tre bela... Momenton (li serĉas en la poŝo, elprenas albumeton kaj montras al amikoj foton. La amikoj rigardadas la foton admirante). Ĉu ne?

N: — Tre bela, sinjoro!

G: — Miraklo!

K (fiere): — La foto estas nenio! Vi vidus ŝin nature, sinjoro... bonege... sufiĉe... Vidu ŝin vere!

N: — Ĉu ŝi estas alta?

K (kun certeco) — Je ĝusta mezuro...

G: — Ĉu blonda?

K: — Oro, ne alio! Rigardu la hararon. Vi kredas ke ŝi ĝin bukligas? Ne, natura... Vidu ŝin matene kiel ŝi blasfemas, ke ŝi ne povas kombi ĝin... Estas granda afero!

N: — Kiom da jaroj havas ŝi?

K: — Kiom vi kredas laŭ la foto?

N: — Ĉirkaŭ dudek kvin.

K: — Vidu! Kaj vi diris, ke la foto ekimpresis vin... Ŝi ankoraŭ ne havas dudek unu jarojn.

G: — Estu paĉjo!... Ŝi vivu! Vi scias kion elekti... kaj vi amas ŝin?

K: — Tre!... Ĉu mi ne amu ŝin! Granda afero, sinjoro, mi diras al vi. Sed en mia stacidomo, komedio! Ĉiuj vojaĝantoj, se la vagonaro pasas tage, la tuta anaro turnas la kapon kaj rigardas ŝin ĉe la fenestro... Ĉar ni loĝas en la stacidomo.

N: — Sed... la ĉefo kie loĝas?

K: — Same, en la stacidomo.

G: — Ĉu la ĉefo havas familion?

K: — Ne! Li ne volas edziĝi, dirante ke li ne amas la virinojn. Kaj Marinja ofte primokas lin, granda afero! Ŝi ĉikanetas lin, kaj vidu — li estas belulo, se li koleras. Iufoje ŝi lin ĉikanetis kaj ili tre koleris... ne interparolis... tutan tagon.

N: — Kaj poste?

K: — Ni interakordiĝis, ili devas repaciĝi. Se ni kune manĝas... povas iu alveni ĉe ni... certe, ne decas. Ili restis seriozaj, ankaŭ mi ŝajnigis min seriozulo, ... kaj diris al la ĉefo: Pardonu, mia kara, mi piedpremis vin, kaj poste ni ekridis.

G: — Sed la ĉefo... kia homo estas?

K: — Tre bona kavaliro, fraŭlo...

N: — Ne, ne pri boneco, sed kiom da jaroj li havas?

K: — Ha!... Ĉirkaŭ tridek jarojn... vidu, sinjoro, bela viro. Momenton, mi forgesis (li serĉas en la poŝo, elprenas albumeton). Jen! (La amikoj prenas la foton kaj rigardas ĝin kun ĵaluzo). Estas!

G: — Fortika viro!

K: — Vi vidu lin natura! Pli alta ol vi kaj ankoraŭ la foto ne estas ruĝkolora. Vidu lin kiam li metas la ruĝan ĉapelon klinigite! Bonege, sinjoro! Li havas lipharojn kiel abanoso kaj brovojn! Se preterpasas, vagonaro ĉiuj sinjorinoj rigardas lin, se li ne havas ruĝan ĉapelon, ili, diablinoj, rigardsorĉigos lin.

N: — Sed pardonu min, ke mi demandas. Ĉu vi havas infanojn?

K: (mirigite) — Kion vi parolas paĉjo? Mi estas edziĝinta nur de antaŭ kvin monatoj...

N: — Tiel?

K: — Kaj ni esperas... Kioma horo estas? Vidu...

G: — Du kaj kvarono.

K: — Nun ili eniras en Leordenj.

N: — Mi petas, sed kion vi profesias en la stacidomo?

K: — Ĉu mi? Deponejestro... Ĉu ni ankoraŭ trinkos ion?

G: — Jam malfrue — morgaŭ matene ni havas oficon.

K: — Ankoraŭ unufoje... Knabo! Tri...

N: — Kaj ĉu vi nun havas libertempon?

K: — La ĉefo jam permesis al mi, se mi volas foriri. Mi povas foresti eĉ po tri tagoj, precipe nun, ne estas tro da laboro.

G: — Paĉjo, permesu al mi trinki je la sano de via edzino... Ŝi vivu!

K: — Mi dankas al vi!

G (volas trinki, singultas kaj ridegas): — Paĉjo! Permesu al mi, ke mi kisu vin! (ili reciproke sin kisas). Vi estas tre dolĉa, kiel mielo! (ĉiuj ridas). Mi tre ŝatas koni la ĉefon kaj vian edzinon... (afable) Kion faras ili nun?

K: — Ili dormas... kion fari... kioma horo estas?

N: — Estas precize la tria!

K: — Ili eniras en Piteŝtj... Tie haltas tridek tri minutojn. (la amikoj ĉirkaŭprenas lin kaj kisas).

G: — Paĉjo, vi estas feliĉa homo! ... Vidu!

K: — Jes, tiel vice estas... mi estas feliĉa. Laŭdego al Dio! Mi havas be-

letan edzinon, ŝi vivu! Mi havas bonan oficeton. Granda afero! Mi estas deponejestro... se ne fluas, gutetas! Koncerne al la ĉefo nenio direnda, li estas kiel mia frato, se li estas mia bofrato!

(Ambaŭ amikoj ridante, restas tre konsternite).

N: — Ĉu bofrato vi diris?

K: — Se li estas la frato de Marinja... Kion vi kredis?

G: — Tiam ni nenion sukcesis...

K: — Kiel vi nenion sukcesis?

N: — Ni pensis...

K: — Ĉar kiel tiam, paĉjo, se ili ne estus gefratoj, ĉu estas eble? Kiel? Lasi belan virinon... nokte... kune kun bela viro? En ejo aparta? (okulumas. Ĉu? (ridante) ... Interese! ... sciu, ke vi plaĉas al mi... Kioma estas nun?

N: — Kioman vi volas?

K: — Sed tamen mi volas scii, kie estas Marinja nun.

N: (enue) — Tri kaj duono.

K: — Ili eliras el Piteŝto... Mi iru ien trinki po glaso da vivo!

G: — Ni ne plu iros.

K: — Kial?

N: — Vi ne havas plu spriton!

DEZIRAS KORESPONDI

ĈEHOSLOVAKIO

60 geesperantistoj — kun ĉl. PI. Adreso: Esperanta rondeto ĉe Uzina Klubo R.O.H. Strojany Tatra, Kolin.

Jiri Leppelt (19-jara), Tombova 31, Police nad Metuji — pri turismo, ĝas-musiko; interŝ. PI, gramofondiskojn.

Erzsike Bachorecz, ul. Dukelskych hrdinov 4, Nové Zámky — interŝ. paperajn buŝtukojn kun ĉl.

Jaroslav Zika (25-jara), Fruktarboesplora instituto ĉe la Ĉehoslovaka Akademio, de Agrikultursciencoj, Holovousy, p. Ostroměr — prefere kun samfakuloj.

Karel Zikmund (28-jara, fraŭlo), Nizkov 13 — kun ĉl, pri ĉt.

Josef Durček, Zitenicen. 76, (okr. Litoměřice) — kun ĉl.

JUGOSLAVIO

Kvar gelernantoj el Bajmok — kun ĉl pri geografio; PI. 1) Milan Ivišević (13-jara), JNA-armije 22; 2) Marca S. Radulović (14-jara), Somborski Put; 3) Dušan Andrić (14-jara), Tri Istarske zrtve; 4) Stefan Šetaković (13-jara) JNA-armije 2.

Tri oficistinoj, fraŭlinoj el Bajmok: 1) Savca Vukotić (14-jara), Cara Lazara 5 — kun ĉl pri poezio, belarta literaturo; PI; 2) Sofija Marović (24-jara), Cara Lazara 16 — kun ĉl pri ĉt; interŝ. modgaz., PI; 3) Milena Ivošević (23-jara), Save Kovačević 10 — kun ĉl pri la spertoj de E-grupoj; PI.

Simon Cindel kaj Ana Cindel (geedzoj), kamparanoj (35- kaj 33-jara), Zmaj Jovina 21 — kun ĉl pri terkulturo, bestbredado kaj familia vivo.

ELSUB LA PLUMO DE NIAJ EKSTERLANDAJ AMIKOJ

Nia soveta k-do Jakov Vlasov, ul. Fevral'skaja 133, Ŝadrinsk, Kurgansk-koj obl., Sovetunio skribas al ni:

«Tre longe-longe, antaŭ pli ol 30 jaroj mi havis en Bulgario bonajn korespondamikojn. Kaj estas tre interese trovi ilin nun. Jen antaŭ mi kuŝas la letero de Nedelko Lazarov Dimitrov el urbo Popovo, datumita la 11-an de oktobro 1927. Ĝi estas skribita per infana skribmaniero. Tiam Nedelko estis knabo kaj vizitis duan klason de la urba progimnazio. Forpasis jam 33 jaroj. Li nun estas ĉirkaŭ 45-jaraĝa. Ĉu li estas viva? Kian vojon li elektis? ...

Jen estas letero el vilaĝo Rajkovo, datumita la 10-an de marto 1933. Lia aŭtoro estas eksinstruisto de unuagrada lernejo Angel Spasov. Tiam li estis 28-jaraĝa. Kiel komunisto li estis maldungita. Li skribis al mi: «Mi estas malsana, ĉar dum la nokto de 7-a kontraŭ la 8-a de marto 1933 mi estis arestita, kruele batita kaj ĵetita tute nuda en la malvarman riveron fare de la bulgara polico».

Plie li skribas pri la mizera stato de la kamparanoj, pri malprogreso de la ŝafbredado kaj tabak-produktado, pri malsato kaj malsanoj de la laboruloj. Estas tre interese koni ĉu k-do Spasov estas viva? Ĉu li ĝisatendis la venkon de la popolo? Li estas preskaŭ mia samaĝulo, nun 55-jaraĝa. Kie li loĝas kaj kion li faras? Ĉu ankaŭ li estas agema esperantisto? Kiel papilion mi gardas la senditajn de li bulgarlingvajn jurnalajn:

1. «Pogled» n-ro 7 de 5.3.1933. Ĝi havas ruĝan algluitan etiketon kun adreso «Mudjo Stoev, s. Rajkovo, Paŝmaklijsko».

2. «Pogled» n-ro 9 de 19.3.1933 (kun portreto de la karega Karl Marks).

3. «Mejdunaroden rabselkor» n-ro 6 de 15.2.1933 (kun nia batalslogano «Tutmondaj proletoj, unuigu vin!»).

Mi estas kompartiano de 1929. Mia malgranda letero pri la broŝuro de k-do Anton Jugov aperis en «Nuntempa Bulgario», n-ro 8, 1960.

ĈINIO

Zhan Yuan-Guang (filatelisto), Ting Xing Lu 314/9, Shanghai — kun seriozaj filatelistoj; interŝ. PM — neuzitajn laŭ serioj.

JAPANIO

Rigin Nakai (komercisto pri tolajo), A-32 Murata, Showa, Nagoya — kun samprofesiajnoj.

PROF. D-RO G. CANUTO

La 29-an de oktobro j. k. mortis subite la prezidanto de UEA Prof. D-ro Canuto, profesoro de jurmedicino, eksrektoro de la universitato de Parma, Prezidanto de la Itala Esperanta Federacio, membro de la Akademio de Esperanto.

Giorgio Canuto naskiĝis la 3-an de junio 1897 en Torino. Esperanton li eklernis en 1925. Li fariĝis unue prezidanto de la loka grupo. En 1928 Canuto estas jam vicprezidanto de IEF kaj ne post longe — ĝia prezidanto. Post la ekŝigo de Malmgren Profesoro Canuto estis elektita prezidanto de UEA, en kiu posteno lin trafis la morto.

Pro malsano Prof. Canuto ne povis ĉeesti la lastan Universalan kongreson en Bruselo, sed dum la tuta daŭro li telefone informiĝis pri ĝia laboro. Apenaŭ resaniĝinta li partoprenis vicle la 31-an Italian Esperanto-kongreson en Cortina d'Ampezzo (10-16.IX. 1960). Tie li favore akceptis la bulgaran delegiton kaj de la kongresa tribuno faris propagandon pri nia revuo «Nuntempa Bulgario».

CK de BEA en la nomo de la bulgaraj esperantistoj esprimis kondolencojn al la familio de Prof. Canuto.

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) preparas la eldonon de **Internacia kantaro** kun muziknotoj.

Ni petas, karaj samideanoj helpu la preparon, sendante diversajn kantojn — porpacajn, junularajn ktp.

Teksto sen notoj ne estas uzebla.

Sendu al Sofio, P.K.44, N. Nikolov.

LA JUNULARA BALO

okazos je la 4-a de febru-
aro 1961 vespere en
Plovdiv

Aliĝu tuj, ĉar la lokoj
estas limigitaj. Kotizo 25 le-
voj (inkluzive la enirpa-
gon, hotelon kaj vesper-
manĝon).

Adreso: Plovdiv, per
poŝtmandato sendita al
konto 15,1878 DSK — di-
strikta branĉo, por Espe-
ranto-societo „Kulturo“.



*Ĉu vi vidas — dancas ili
sub la sorĉaj sonoj de la ĝaz',
ejo pompa lumas brile,
tintas feste glas' kun glas'.*

*Ne hezitu! Bal' okazas foje,
foje ni dancados, kantos ĝoje.
Ĉu ja eblas tion preterlasi!
Tuj aliĝu — vigle kaj amase!*

ЗАДОЧНИ КУРСОВЕ ПО ЕСПЕРАНТО

София, п. к. 222

ВАЖНО ЗАДОЧНИ КУРСОВЕ ПО ЕСПЕРАНТО

ЗА УЧЕБНАТА 1960—61 г. ръководството на курсовете пуска

НОВИ МАТЕРИАЛИ за задочно и присъствено изучаване на есперанто.

СЪИДЕЙНИЦИ! Препоръчайте на вашите близки и познати да се запишат в

ЗАДОЧНИЯ курс по ЕСПЕРАНТО за начинаещи.

А ВИЕ САМИТЕ се запишете в курса за напреднали, за да ОБОБЩИТЕ познанията си по езика.

НОВИТЕ материали са разработени от Кунчо Вълев и Мих. Лангов, като са пригодени за присъствено, и за

ЗАДОЧНО изучаване на ЕСПЕРАНТО.

МАТЕРИАЛИТЕ са изготвени под редакторството на др. Ив. Сарафов.

ИСКАЙТЕ подробни сведения за двата курса на адрес:

ЗАДОЧНИ КУРСОВЕ

СОФИЯ, П.К. 222

SUB LA JUGO

la fame konata ĉefa verko de la bulgara klasikulo

IVAN VAZOV

TRADUKITA EN ESPERANTON sub la redakteco

de A. Simeonov kaj S. Simeonov kun antaŭparolo

de Profesoro Petâr Dinekov

luksa eldonajo — tole bindita — paĝoj 462

plej bona donaco por niaj eksterlandaj korespondamikoj

PREZO 17.30 LEVOJ

Al societoj kaj kolektivaj mendoj rabato 15%

